

Kimbanguismo

Claude Gacond, 136-a radioprelego, 1966.05.11 & 1966.05.14

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Svislando neniam posedis koloniojn. Pro tio la malkoloniado ne havas grandan eĥon sur la sinteno de sviso ĝenerale. Tamen multaj svisoj ludas rolon en la teknika helpado al la subevoluintaj landoj. La ideo mem de labor-restadejoj organizataj por helpi malriĉajn komunumojn ĝermis en la cerbo de sviso hodiaŭ mondfamiĝinta.

A.- Ni pensas al Pierre Ceresole, la iniciatinto de Internacia Civila Helpservo. La vivo kaj verkaro de tiu franclingva sviso daŭre influas la penson en Romandio.

Cl.- Unu el tiuj heredantoj de la idealo de Pierre Ceresole, François Choffat, medicina studanto en Lausanne, dediĉas siajn fortojn kaj libertempon al la interreligia kaj intergenta reamikiĝo. Li cetere aktivas en la Internacia movado por reamikiĝo, en kies kadro Pierre Ceresole organizis sian unuan labor-restadejon post la unua mondmilito.

A.- Pasintan someron dum internacia kongreso okazinta en Aarhus (Danlando), tiu juna sviso François Choffat renkontis du afrikajn delegitojn, kiuj sin diris membroj de la Kimbangua Eklezio.

Cl.- Diskuto pri tiu eklezio naskiĝinta en Kongolando kaj nun forte enradikiĝinta ankaŭ en la najbaraj teritorioj vekis la intereson de nia medicina studanto.

A.- Tiu eklezio ŝajnis organizita kaj estrata nur de nigruloj, kio vekis la persekutemon dum kvardekjaroj de la kristanaj misioj kaj de la kolonia registaro. Sub la imitado de ĝia fondinto Simono Kimbangu, kiu estis neperfortema kristano, la kimbanguanoj ŝajne neniam respondis al la persekutadoj per venĝo kaj malamo.

Cl.- Ĉu tiu kimbangua eklezio personigis ĝis nun nekonatan fokuson de satjagraho? Jen grava demando por admiranto de Mahatmo Gandhi.

A.- La neperfortemo de la kimbanguanoj ŝajnis spontana. Ĝin naskis meditado de la evangeliaj skriboj. La du kongolandanoj ne konis la penson de Gandhi, kiu tamen komencis sian pacan bataladon en Sudafriko; nek tiun de la usona nigrulo Martin Luther King junulo, kiun la Nobela Pac-premiado subite famigis; nek tiun de la italo Danilo Dolci, kiu hodiaŭ personigas en Eŭropo satjagrahon per sia luktado kontraŭ la sicilia mafio.

Cl.- Tiuj afrikanoj izolitaj en la vasta Kongio estus povintaj renkonti la penson de aliaj satjagrahanoj nur per la gazetaro. Kaj ni scias, ke la ĵurnalistoj kutimas gravigi ion nur laŭ materiaj kriterioj, ili interesiĝas al la bataloj, kiuj detruas kaj mortigas kaj preteras la revoluciojn, kiuj evitas la sangoverŝadon. Ili eĉ ne povas rimarki, ke io okazas, ĝis kiam la neperfortaj luktadoj ekvenkas. Tiam ili miras pri la okazaĵoj. Ili miras pri la potenco de spiritaj fortoj. Bedaŭrinde ili rapide forgesas sian miron kaj rapidas al la pli facile priskribeblaj revolucioj, kie oni povas nombri kadavrojn. Tiu materialismo malpermesas percepton de la faktoj evoluantaj. Ĝi ebligas percepti nur la akcidentojn kaj kaŝas plej ofte la kaŭzojn de tiuj eventoj.

A.- En niaj elsendoj ni provas juĝi la mond-okazaĵojn laŭ spiritaj kriterioj. Ni deziras percepti la eventojn dum ili naskiĝas kaj pere de ili malkovri la estonton, kiu kreiĝas.

Cl.- Pro tio ni ofte raportas pri movadoj kaj okazaĵoj nekonataj de la vasta publiko. Ni opinias la esperantistaron matura por ilin kompreni kaj mediti.

Kimbanguismo

Claude Gacond, 136-a radioprelego, 1966.05.11 & 1966.05.14

A.- Se la malkovro de kolektivo, kiu praktikis satjagrahon dum tuta generacio sub teruraj persekutoj ne interesas la vastan publikon, tiu evento devas tamen esti salutata en Esperantujo.

Cl.- Pro tio dum kvaro da elsendoj ni turnos niajn rigardojn al Kongolando kaj rakontos, kion konstatis tie François Choffat dum kontakta vizito al la kimbanguanoj. Pasintan jaron ni jam estus povintaj raporti al vi pri la ekzisto de tiu movado, sed al onidiroj ni ĉiam preferas certaĵojn.

A.- Pasintan aŭtunon François Choffat rakontis al ni, kiel naskiĝis en la jaroj 1925-1930-aj tiu nigrula eklezio.

Cl.- En la vilaĝeto Nkamba vivis nigrulo, kiu laŭ la rakontoj havis la kapablon kuraci malsanulojn. Li tion faris biblion enmane kaj en la nomo de Jesuo-Kristo. Estis do kristano, nova varbito de baptista misio.

A.- La homoj alfluadis al tiu vilaĝeto Nkamba. Kaj la misiistoj, anstataŭ ĝoje vidi formiĝo de aŭtonoma kristanismo en sia laborkampo, tuj timis je konkurenco kaj afrikaniĝo. Ili denuncis al la koloniaj aŭtoritatoj la agadon de Simono Kimbangu, ĝin priskribante kiel kontraŭregistaran.

Cl.- Historio ripetiĝas. Dudek jarcentoj antaŭe aliaj religiaj estroj denunci la agadon de homo, kiun oni ankaŭ diris kuracanta malsanulojn.

A.- Estas la paralelismo inter la mortkondamno de Jesuo-Kristo kaj tiu de Simono Kimbangu, kiu favoris la disvolviĝon de la kimbanguismo.

Cl.- La koloniisma registaro bazi sin sur militaj leĝoj por kondamni tiun absolute senkulpan homon. Eĉ advokaton li ne rajtis havi. Kelkaj klarvidantoj avertis la belgan reĝon pri tiu misproceso. La reĝo ŝanĝis la mortpunon al dumviva punlaboro.

A.- Simono Kimbangu predikis al siaj konatoj nevenĝemon kaj neperfortemon. Dum sia longega enkarceriĝo li fidelis ĝis la morto al tiu interpretado de la biblia instruo.

Cl.- Tiu konduto fidela al la maksimumo « *Amu vian malamikon* » estis modelo al miloj da simplaj homoj, kiuj devis suferi pro la blankula okupado. Tiel naskiĝis tiu nigrula eklezio, kiun la malkoloniismo permesas nun ekkoni kaj ekkontakti.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-